

**La protokolo de la reta komitatkunsido de ILEI,
2023.09.22, de la 14:00 ĝis la 16:00 UTC, per Zoom**

Ĉeestis: 27 komitatanoj.

Tagordo

- 1. Malfermo.**
- 2. Kontrolo de kvorumo, inkluzive de la delegoj.**
- 3. Elekto de voĉnombrantoj.**
- 4. Elekto de protokolantoj.**
- 5. Kontrolo kaj aprobo de la komitataj decidoj en la Komitat-kunsido de la 7-a de aŭgusto 2023.**
- 6. Aprobo de la nova financa kontrolisto de ILEI, s-ro Simon Smits.**
- 7. Aprobo de la novaj ILEI-sekcioj de Benino, Kenjo kaj Madagaskaro.**
- 8. Anonco de la loko de la ILEI-Kongreso de 2024.**
- 9. Aprobo de la Raportoj de la Kontrola Komisiono por 2022.**
- 10. Aprobo de la Financa Raporto 2022.**
- 11. Buĝeto 2023 kaj Buĝet-propono por 2024.**
- 12. Diskutado pri IPR kaj JA.**
- 13. Anoncoj de la komitatanoj.**

Iro de la kunsido

Punkto 1. Malfermo.

Malfermis la kunsidon la Prezidanto Ahmad Mamduhi, kiu rememorigis la tagordon kaj metis ĝin surekrane.

Punkto 2. Kontrolo de kvorumo, inkluzive de la delegoj.

Elena Nadikova kontrolis la kvorumon.

La informo pri senditaj delegoj:

Aurora Bute havas 2 voĉojn (+de Mihai Trifoi);

Dider Janot havas 3 voĉojn (de Emmanuel Desbrières kaj de Murielle Caré);

GONG Xiao-feng (Arko) havas 2 voĉojn (+ de Zhou Tianhao);

Jozefo Nemeth havas 2 voĉojn (+ de S.MacGill);

Marc Cuffez havas 2 voĉojn (+ de K.Tytgat).

Entute 6 aldonaj voĉoj.

Konklude: entute estas 55 komitatanoj kaj ĉi-tie partoprenas 27 komitatanoj (inkluzive transdonitajn voĉojn), kio superas la bezonatan por kvorumo trionon de la komitato. **La kvorumo estas.**

Punkto 3. Elekto de voĉnombrantoj.

Laura Brazzabeni demandis, ĉu la voĉnombrantoj devas esti iu estrarano?

Radojica Petrović respondis, ke prefere ne okazu tio. Poste la ĉeestantoj elektis la manieron por voĉdoni – per teknikaj ebloj de Zoom aŭ levante manojn.

Aristophio Andrade ALVES FILHO kaj Aurora Bute konsentis esti voĉnombrantoj.

Punkto 4. Elekto de protokolantoj.

Elena protokolas kaj rimarkis, ke fakte ne tiom necesas la dua protokolanto, ĉar estas registraĵo kaj ĉiuj povos kontroli kaze de bezono aŭ volo. **Aprobite.**

Punkto 5. Kontrolo kaj aprobo de la komitataj decidoj en la Komitat-kunsido de la 7-a de aŭgusto 2023.

Ahmad trafoliumis ĝian protokolon kaj komentis ĉiujn decidojn laŭ ĉiuj punktoj. Ĉiuj decidoj estas plenumitaj. Ahmad demandis pri eblaj komentoj. Ili ne estis.

Marc Cuffez rememorigis pri sia demando aŭguste pri la listo de membroj, kiuj pagis rekte al UEA. Marc ĝis nun ne ricevis ĝin.

Ahmad respondis, ke necesas atendi Karine Arakeljan, kiu venos pli malfrue pro laboro.

Poste okazis aprobo de la protokolo kaj la komitataj decidoj. Ahmad demandis pri kontraŭantoj. Ili ne estas. **La komitataj decidoj de la Komitat-kunsido 2023.08.07 estas aprobitaj.**

Punkto 6. Aprobo de la nova financa kontrolisto de ILEI, s-ro Simon Smits.

Karine ankoraŭ ne ĉeestas. Ahmad rememorigis pri la forpaso de la antaŭa financa kontrolisto kaj anoncis pri la nova kandidato – s-ro Simon Smits, kiu plenumis tiun funkcion antaŭe.

Jozefo Nemeth rimarkis, ke sur la retejo kaj en IPR ĝis nun restis ĝuste lia nomo en la posteno de financa kontrolisto, ĉar oni forgesis ŝanĝi la nomon. Do, ankaŭ fakte li revenis al la posteno.

Ahmad demandis pri la kontraŭantoj. Neniu estas. **Simon Smits estas aprobita kiel la nova financa kontrolisto de ILEI.**

Punkto 7. Aprobo de la novaj ILEI-sekcioj de Benino, Kenjo kaj Madagaskaro

Marija Jerković anoncis, ke ILEI ricevis tri petojn por registri novajn sekciojn. Tiuj estas el Kenjo (la sekciestro – Gilbert SIMIYU SIKALA), el Benino (la sekciestro – Latifou GBADAMASSI) kaj el Madagaskaro (la sekciestro – Miora RAVELOHARISON). Ili ĉiuj sendis listojn kun po kvin homoj. La Estraro diskutis pri tio en sia kunsido, inkluzive pri la listoj de novaj membroj. Marija proponis voĉdoni.

Alessanda rimarkis, ke ili ĉiuj estis helpataj de la Koleghelpa Kaso. Ŝi prezentis la novajn membrojn: ĉiuj el Madagaskaro estas instruistinoj kaj instruas Esperanton, krom unu, kiu ankaŭ iĝos instruistino. Miora ricevis premion Deguĉi.

Marija Belošević demandis, ĉu iu el ili ĉeestas nun? Responde Ahmad petis Laffi interveni, tamen pro teknikaj problemoj tio ne sukcesis.

Laura petis datumojn por enigi novajn membrojn al la dissendolistoj.

Sten SVENONIUS ankaŭ demandis, kial neniu el tiuj tri sekcioj partoprenas en la nuna Komitatkunsido, ja ĝi estas grava. Laura klarigis, ke, ĉar ili ankoraŭ ne estas aprobitaj, ili, verŝajne, ne ricevis la inviton partopreni. Ahmad sciigis pri iliaj skribaj reagoj.

Okazis voĉdono – aparte por ĉiuj sekcioj. Venis demando, kiom da anstataŭigitaj voĉoj estas. Elena klarigis: estas 6. Aristophio kaj Aurora kalkulis voĉojn.

La rezultoj: pri Benino: 1 sindeteno kaj 26 por. Pri Kenjo: 1 sindeteno, 26 por. Pri Madagaskaro: 1 sindeteno, 26 por. Neniu kontraŭis. **Decidite: ILEI akceptas tri novajn sekciojn el Benino, Kenjo kaj Madagaskaro.**

Punkto 8. Anonco de la loko de la ILEI-Kongreso de 2024.

Laura informis pri longa diskutado pri ebla loko de la sekvontjara kongreso. Venis du ĉefaj proponoj: el Tanzanio kaj Brazilo. La Estraro detale pristudis ĉiujn proponitajn kondiĉojn kaj post longa diskutado unuanime decidis, ke ILEI-kongreso-2024 okazos en Brazilo, en la urbo Maceió. La ĉefaj kialoj de tiu decido estis: pli da sekureco kaj ĉeestaj homfortoj. Mulele, la sekciestro de tanzania ILEI-sekcio, konsciis, ke li tre volis havi ILEI-kongreson en Tanzanio, tamen konsentis, ke ili ankoraŭ ne pretas organizi bone ĉion, mankas homfortoj. Ili pripensos pri estonta kongreso. Venontsemajne komenciĝos densa laboro kun Aristophio. Jam okazis la unua renkontiĝo. La kongreso estos hibrida: ĉeesta kaj distanca.

Ahmad dankis ĉiujn pro la laboro.

Marc Cuffez demandis: ĉu la Estraro konsideras, ke homoj, kiuj iros al UK, ne venos al Brazilo. Jes, tion oni pripensis ankaŭ. **Do, decidite: la kongreso-2024 okazos en Brazilo.**

Punkto 9. Aprobo de la Raporto de la Kontrola Komisiono por 2022.

Venis Karine Arakeljan, la kasistino, kaj informis. Pro la forpaso de unu el la nunaj kontrolistoj la Estraro petis s-on Simon Smits esti la dua kontrolisto. Li konsentis kaj rapide faris la raporton. Ĉiuj komitatanoj ricevis ĝin. Tial oni proponas **malŝarĝi la Estraron pri 2022. Decidite.**

Ahmad demandis, ĉu estas demandoj / proponoj pri la raporto de la Kontrola Komisiono? Ne estis.

Punkto 10. Aprobo de la Financa Raporto 2022.

Informis denove Karine. ILEI havas profiton por 2022, tamen oni ne devas forgesi pri defecitoj de niaj revuoj: granda por JA kaj ne tiom granda por IPR.

Ahmad demandis, ĉu estas demandoj / proponoj pri la financa raporto?

Sten SVENONIUS: estis malgranda diferenco inter du sumoj de diversaj fondusoj komence kaj fine de la jaro 2022. Karine klarigis.

Marija Beloŝević: kiom da membroj entute pagis kotizojn?

Karine: por IPR papera – 199 abonoj, reta – 201. Ŝi rimarkis, ke estas diferenco inter ŝiaj ciferoj kaj datumoj de Hamzeh. Ŝi supozas, ke en ŝia listo ne estas tiuj, kiuj ricevas la revuon senpage. La diferenco egalas al 274 retaj kaj 41 paperaj.

Marija Beloŝević: ĉu estas simplaj abonoj, sen membreco?

Karine: estas, sed tre malmultaj.

Ahmad: estas malpli da kotizoj por 2021.

Karine: ni ne pagis al Jozefo por redaktado, ĉar li aparte ne petis kaj Karine maltrafis lin. Jozefo opiniis, ke tiu pago estas aŭtomata. Kiam la situacio evidentiĝis, Karine repagis al li.

Marija Beloŝević: kia estas gajno por kongreso-2022?

Karine: ne eblas diri pri gajno, ĉar ILEI grandan sumon repagis, ekzemple, al koreoj.

Laura rimarkigis, ke por 2022 ne estis kotizoj, estis nur donacoj.

Marija Beloŝević: ĉu la stato pri membreco devenas el la listo de Marija Jerković? Membroj devas pagi fakte ĝis la 31-a de marto de la sekvonta jaro.

Karine: tio ne ĉiam eblas, ĉar, ekzemple, en Francio oni komencas novan jaron en novembro. Sekciestroj devas regule zorgi pri kotizoj.

Marija Beloŝević: ĉu estis donacoj, kiuj kaŭzis profiton de la kongreso-2022?

Karine: ni havas donacojn al la ĝenerala kaso de ILEI kaj por JA. Sed la ĉefa sumo estas por la ĝenerala kaso.

Marija Belošević: ĉu la redaktora honorario estas kun imposto aŭ sen ĝi?

Karine: ŝajnas esti sen, ĉar ŝi ne pagis imposton.

Marija Belošević: de kie aperis mono por sendi librojn al Afriko?

Karine: ni ricevis donacojn de Renato Corsetti.

Marija Belošević: kial tio ne aperas en la financa raporto?

Karine: la libroj estas senditaj en 2023, tial tio aperos en la financa raporto por 2023.

Marc Cuffez rememorigis pri sia peto sendi al li liston de la membroj de belga ILEI-sekcio, kiuj pagis tra UEA. Karine sendos.

Poste okazis voĉdono pri ambaŭ raportoj: de la Kontrola Komisiono kaj pri financa raporto. **Ambaŭ raportoj estis unuanime aprobitaj.**

Punkto 11. Buĝeto 2023 kaj Buĝet-propono por 2024.

Karine avertis, ke povos okazi ŝanĝoj en la buĝeto por 2023 post kiam ŝi sumigos la financan raporton por 2023 kaj la buĝeto estos iom reviziota.

Marija Belošević demandis pri situacio kun Manlibro.

Karine respondis, ke ILEI ne ricevis tiun monon ĝis nun kaj, verŝajne, ni elspezigos tiun sumon.

Marija Belošević: surbaze de kies membroj estis rezultita signifa falo de ILEI-membraro ĝenerale?

Karine kontraŭis, ke ne okazis signifa falo de membraro. La kvanto iom falis en 2021. Sed poste homoj simple preferas ricevi retajn revuojn.

Sten: ĉu okazis decido pri membrototizo por 2024?

Karine neis, ne okazis fina decido, por 2023 ni ne ŝanĝis.

Sten: laŭ lia sperto, oni kutimas dum la jarkunsido fari tiujn decidojn. Tamen nun venas tempo por peti homojn sendi kotizojn. Do, kiam aperos tiu decido?

Karne: post monato, oktobre.

Dider: pri ŝanĝoj de kotizoj ni devas decidi jam somere. Alikaze, ekzemple, en Francio okazos ĥaoso. Li proponis tial ne ŝanĝi la kotizon por 2024 kaj fari pli fruan decidon por 2025.

Marc Cuffez ankaŭ subtenis la ideon, ĉar sekvontsemajne li devos sendi mesaĝon al membroj de BEL.

Karine diris, ke, laŭ ŝia opinio, ne bonas nun plialtigi kotizojn, ĉar membraro ne kreskas kaj ni povas perdi homojn.

Ahmad: ankaŭ financa stato de la mondo ne pliboniĝas, bedaŭrinde. Necesas instigi donacojn.

Dider: nun venas tempo, kiam homoj pagas al siaj regionaj, landaj kaj aliaj organizoj, do, homoj devas strikte scii bazajn kotizojn kaj vidi buĝetojn.

Sten proponis lasi kotizojn por 2024 senŝanĝaj kaj postaj decidoj okazu ne malpli frue ol en septembro. Tiam ĉiuj scios, kion atendi de la nova jaro.

Ahmad proponis voĉdoni pri tiuj du proponoj.

Laura demandis, ĉu ni rajtas voĉdoni pri tio, se koncernaj demandoj ne estas en la tagordo?

Radojica respondis, ke kotizoj estas buĝetaj detaloj, sekve, kuŝas ene de tiu punkto.

Okazis voĉdono kun ĉies jesoj (28). **Decidite: kotizoj por 2024 restos samaj kaj postaj decidoj okazu ĉiam en septembro.**

Punkto 12. Diskutado pri IPR kaj JA

Ahmad invitis eldiri opiniojn. Jam okazis diskuto, tamen povas esti, ke ekzistas aliaj aspektoj.

Tieko informis, ke 5 membroj el 20 superaj membroj en Japanio ne ricevis paperan revuon № 2.

Jozefo proponis demandi Hamzeh-n kaj Stano-n kaj esplori la problemon.

Didier: komenciĝis interŝanĝo de mesaĝoj pri tiu temo. La unua demando estas pri financa situacio. Se ni apartigu la enspezojn kaj elspezojn de paperaj servoj, nia buĝeto ricevos grandan profiton. T.e. se ni evitos tiujn paperajn elspezojn, ni ricevos grandajn rimedojn por instruado kaj aliaj projektoj. Hodiaŭ multaj membroj al kutimiĝis al paperaj servoj, sed moderna mondo preferas retajn servojn. Do, ni devas pensi pri bezonoj de tiu moderna mondo. Pri JA la afero preskaŭ samas: papera eldono kostas multe. IPR estas servo por membroj, JA – servo por instruistoj. Ni multe diskutis, tamen ne venis solvo. Multaj asocioj nun komunikas rete por servi aktivaĵojn. Ni povas konservi kelkajn numerojn jare kiel tradicio. Pri IPR ni devos pripensi pri bezonoj de novaj membroj. Pri JA: ni devus demandi ĉe niaj membroj, kion ili volas havi rilate al JA kaj kiujn eblajn solvojn oni proponus.

Alessandra: antaŭe dum la estrarkunsido ni diris, ke se IPR estos deficitata, ni pripensu pri malaltigo de kvanto de paĝoj. Alia afero: la membroj de korea asocio ĉiam aldonas donacojn al siaj kotizoj, ĉar ili pensas, ke estas kortuŝe malbona afero, se paperaj revuoj malaperos. Ili volas subteni ĝuste paperan IPR-n, kaj tio tre gravas.

Radojica: ni ne povas nun ŝanĝi la kvanton de paĝoj, ĉar ni kolektis kotizojn por la definitiva kvanto de paĝoj, tio estas kvazaŭ kontrakto. Sed pri posta sorto ni devas pensi. Tamen la punkto de nia kunsido estas: kiel savi IPR-n kaj JA-n. Ni devas havi firman starpunkton, ke ILEI ne povas pagi pli ol estas rimedoj en ĝia kaso. Ni devas anonci, ke ILEI ne povas krediti revuojn memstare kaj proponi kune eltrovi eblajn solvojn por savi ilin. Ja IPR kaj JA estas tre gravaj kulturaj valorajoj ne nur de ILEI, sed de Esperantujo ĝenerale.

Lia propono estas, ke fine de la jaro ni havu apartan komitatkunsidon ĝuste pri tiu demando – kiel savi IPR-n kaj JA-n kaj financi ilin. Kaj tuj alvoki al ĉiuj pripensi pri estonta sorto, ĉu per plimultigo de abonoj aŭ per donacoj. Nun ne estas tempo.

Ahmad demandis, ĉu ni povas havi rimedojn flanke de iu organizo, kaso aŭ fondusoj por JA. Ĉar estas bonega kaj koservinda revuo, tamen ni ne povas tre altigi ĝian prezon.

Marija Belošević: ĉu estas planata regula kampanjo por akiri monon por JA? Iuj fondusoj havas sufiĉe da rimedoj. Ĉu estas ĝenerale projektoj por uzo de mono kaj pri varbado de novaj kontribuantoj?

Radojica proponis, ke ni notu la demandon de Marija kaj ke la Komitato petu la Estraron prepari detalan respondon al tiu demando. **Konsentite.**

Marija Belošević rimarkigis, ke estas eraro en al tabelo. Karine promesis korekti.

Krome, Marija rememorigis, ke ni ne voĉdonis pri la buĝeto -2023 kaj 2024. Ni parolis nur pri kotizoj, sed tio ne estas akcepto de la buĝetoj.

Laura proponis, ke hodiaŭ pri la buĝeto 2023 ni ne voĉdonu, Karine konsentis.

Tamen Marija diris, ke estas punkto 11 pri tio.

Radojica klarigis, ke ne temas pri aprobo de la buĝetoj, estas nur analizo kaj propono.

Marija Belošević kontraŭis, ke tiam ni devas voĉdoni pri la buĝetpropono - 2024.

Ahmad proponis lasi voĉdonon por posta tempo, kiam ĉiuj kalkuloj estas faritaj.

Tamen Marija kontraŭis, ke kutime oni komence aprobas proponon – ideon kaj poste okazos revizioj kun korektoj ktp. Alie tio signifos, ke ni ne havas bildon por 2024.

Karine: dum antaŭaj jaroj ni aprobis la buĝeton de la kuranta jaro nur somere.

Laura: la problemo de la buĝetpropono dependas de la leĝoj de iu aŭ alia lando . Ni estas internacia organizo. Por ni oni devas decidi, kiam oni volas, nur ne post la fino de la jaro.

Marija tamen insistis pri voĉdono de la propono: ni pridiskutis la buĝeton kaj nun ni povas aprobi la proponon por havi bazan buĝeton.

Okazis voĉdono pri la buĝetpropono por 2024. Nun ĉeestas 21 partoprenantoj kun 5 aldonaj voĉoj, entute 26 komitatanoj. La rezulto de la voĉdonado: 26 jesoj, neniuj kontraŭ aŭ sindetenas. **La buĝetpropono por 2024 estas aprobita.**

Punkto 13. Anoncoj de la komitatanoj.

Marc: en IPR devas aperi informo pri la kongreso kaj la aliĝilo, ĉar ne ĉiuj havas retaliron. Ekzemple, laŭ la lastaj ciferoj, en Belgio 20 % da loĝantoj ne havas retaliron. Kutime la aliĝilo kun la informo aperis en la lasta numero. Necesas aperigi la aliĝilon ankaŭ papere ĉi-jare kune kun adreso, kien oni povas sendi la aliĝilon poŝte, se oni ne havas retaliron.

Laura diris, ke venontsemajne ŝi parolos kun Aristophio pri mendoj, pagoj ktp. Kaj la 20-an de oktobro dum la estrarkunsido oni decidis pri kotizoj. Tiel la informo eniros la lastan numeron.

Jozefo klarigis, ke kutime li fermas la revuon fine de oktobro. Tamen, se por aliĝilo necesas atendi 1-2 semajnojn, tio eblas.

Marija rememorigis, ke ni havas komitatanojn en diversaj horzonoj.

Radojica atentigis pri la artikolo en la nova numero de IPR pri la Erasmus+. Temas pri la projekto de Serbia E-Ligo. Danke al ĝi du serbaj instruistinoj partoprenas en la seminario en Poznano. Krome, estas planata seminario en Serbio venontjare. Komenco de la jaro estas la limdato por prezenti novajn iniciatojn.

Dider proponis okazigi la sekvan Komitatkunsidon pli frue pro diversaj horzonoj, kaj sabate.

Marc subtenis la proponon pri pli frua kunveno – matene laŭ la eŭropa tempo.

Konsentite.

Fine Ahmad dankis ĉiujn pro la partopreno kaj adiaŭis.

La Komitatkunsido finiĝis.